

Ĉineske

(18)

e-Librigita de Elerno

marto 2017

Daolianzi

(Kanto de Lavantino)

ĉina fiksforma poemo el 5 versoj de 33,7,77 silaboj, laŭ rimaranĝo xa, a, xa (x=senrima)

Zhuang Qixiong

NiBabilu*

En nokto
kun fluor’
mi lit-babilas per kor’
sol-sidas sen ĉagren’
nur bild-skriba bonodor’.

**Nibabilu estas la nomo de komunikiĝa softvaro WeChat, per kiu oni facile interbabilas interrete.*



Kuxiangsi

(Profunda Sopro)

ĉina fiksforma poemo el du samaj strofoj kun po 8 versoj de 7,33,8,33,33 silaboj, laŭ rimaranĝo a,xa,xa,xxa (x = senrima)

Cezar (Germanujo)

Folidanc'

**Foli' flugas en la vent'
laŭdance
de serpent',
ĝojpetolas
eĉ sen iu pent',
miraklas enaŭtune.
Jen magi'
dum moment'.**

**Mi observas kun atent'
kun vigla
freŝa sent'
kaj eŭfori'
la ludon de l' vent'.
La lumo min ensorĉas.
Folidanc',
kia splend'.**

Pusaman

(Budhista Dancisto)

ĉina fiksforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de
7,7;5,5; / 5,5;5,5 silaboj kun para rimo

Zhuang Qixiong

Rendevuo

**Floroj, lun' en nebulo.
Mi nokte al karulo
ŝtrumpe sur ŝtupar'
per man' por ŝupar'.**

**Mi tremis de ĝu'
en pentreja sud'.
Nur mi—tro rara !
“Karesu, kara!”**



Shiliuziling

(Dekses-Silabo)

ĉina fiksforma poemo el kvar versoj de 1, 7, 35 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,a,xa (x=senrima)

Rebeka Senfamilia (Usono)

Tie ĉi malbone

vir'
rigardanta kun dezir'
ne scias,
ke mi estas kvir'.*

ĉi
kaŝo gardas min (defi'
malsimpla)
de la transfobi'.**

mal'
de la beno de vual':
post lerno
pri sana detal',

ĉu
tia ĉi individu'
ĝentila

afablados plu,

aŭ

ĉu mi, pro bola baldaŭ'

forkuru

al la malantaŭ'?

**kviro: kvir estas iom neologisma radiko, ne inventita de mi, konsiderata pli mallonga ol "apartenanta al la komunumo de gejoj, lesboj, ambaŭseksemuloj, transseksuloj, ktp" kaj malpli konfuza ol "GLATa". laŭ mi la radiko estus "kvir/a", kaj "kviro" estus poezia simpligo de "kvirulo".*

***transfobio: malamo kaj/aŭ neracia timo de transseksuloj. komparu "homofobio".*

Por Sofia

Vi

en sinmorta agoni'

konsilis,

"Postvivu por mi."

Jam

ĉesis pensi vi pri sam'

inter ni.

Kial vi ne, Dam'?

Vin

mi bezonis, amikin'.

**Vi estis
mia insulin'.**

**Cel'
ne ŝanĝiĝos, ho Abel'
Reĝina,
sed mankos miel'.**

*Temas pri neesperantista amikino mia, "QueenSophia",
kiu mortis antaŭ du monatoj.

Lily

Kaŝa amo

**Am'
kaŝa brulas kiel flam'
ardanta
disvolviĝa jam.**

**Al
li mi ofte kun amar'
sopiras
sen ajna deklar'.**

**Mi
eĉ imagas kun pasi'
ke amas
min li kun mani'.**

Sed
je mia pensa obsed'
ignoras
min li sen ridet'.

En
mia kor' naskiĝas ĝen'
turmenta
kaj trista ĉagren'.

Li,
kvazaŭ venus kun magi',
songiĝas
min pri amebri'.

Per
man' li kun dolĉa tener'
karekus
min en basa kver'.

Min
kovrus per kisoj sen fin'
li ĝoje
je mia fascin'.

Lang'
lia lekus min sur vang'

**volupte
per lia brak-tang’.**

**Sur
mi li knedus en plezur’
la mamojn
en ĝema murmur’.**

**Je
eroto impulsa tre
li tordus
ĝis seks-apoge’.**

**Jam
mi sub lia kaco-ram’
moliĝus
sur plata tatam’.**

**Aĥ,
kiel sub lia atak’
kvietus
mi en am-bivak’!**

Mandio

Februaro

**Ĉi
momente glimas radi’**

printempa
el vintra ebri’.

En
frosta vento en ĝarden’
verdeco
ekŝosas sen ĝen’.

Neĝ’
kvankam restas sur monteĝ’,
alvenas
jam la varm-sieĝ’.

Ĝoj’
lirlas glitante en roj’,
dancante
salte kun orgojl’.

Am’
fermentas en koro jam,
ŝi kaj mi
nin banas en flam’.

Sero

Neĝa pejzaĝo

Neĝ’
tenas per blanka sieĝ’

**la teron
jen sen ajna breĉ'.**

**Roj'
fermas buŝon kun malĝoj'
ŝajn-morte
kuŝante ĉe l' voj'.**

**Sur
arboj pendas branĉoj nur
de glaci'
en venta susur'.**

**Bird'
serĉas grenerojn en bild'
arĝenta
per la beka mild'.**

**El
herboj kuras en blank-hel'
leporo
panike en gel'.**

**Bru'
en park' aŭdiĝas ne plu,
nur restas
bril-blanka enu'.**

**Hom’
sola neĝon antaŭ dom’
balaas
sur blanka gazon’.**

**Fum’
kaira en hela lum’
spirale
leviĝas jam nun.**

**Bril’
de l’ suno kun malfacil’
penetras
per lanta suspir’.**

**Mond’
tuta jen en frida ond’
tremetas
al neĝa renkont’.**

Vejdo

Aŭtuna vento

**Vent’
aŭtuna el okcident’
alblovas
je nia kontent’.**

Ĝi
alportas friskon al ni
donace
per dolĉa ebri’.

Al
kampoj la ora vual’
ŝutiĝas
en gracia fal’.

Por
bonrikolto kun favor’
ni penas
kampe kun fervor’.

Vent’
aŭtuna el okcident’
alblovas
je nia kontent’.

Ĝi
jen ĝojon sendas al ni
sincere
kun sia pasi’.

Jen
amon ni per brakumplen’
kolektas

en aŭtunfesten’.

Vent’
aŭtuna el okcident’
alblovas
je nia kontent’.

Ĝi
donas fruktojn per magi’
al arboj
en pompa seri’.

Dank’
al aŭtun’, estas ne mank’
de feliĉ’
jen en nia sang’.

Sub la luno

Lun’
flagras surĉiele nun
komforte
en nuba brakum’.

Lum’
ĝia —jen opala fum’
filtriĝas
tra nub’ de aŭtun’.

**Per
tremaj briloj kun leĝer'
kareas
amparon sur ter'.**

**Li,
pasia, kveras kun ŝi
intime
en kiso-seri'.**

**Vent'
ekblovas el firmament'
susure
kun aroma tent'.**

**For
nuboj en tiu ĉi hor'
vanuas
disen en langvor'.**

**El-
venas la lun' sur ĉiel'
purbrile
kun plenluma bel'.**

**Ŝi
kaj li en ama mani'
kuniĝas**

treme kun pasi'.

Al

**la lunlumo de kristal'
sin ŝuldas
am-festival'.**

Nuna diluvo

EI

**la nubkovrita ĉiel'
lavangas
akvo kun ribel'.**

Ĝi

**jen abrupte kun muĝ-kri'
faladas
je homa anksi'.**

Flu'

**akva torentas kun bru'
dronigas
mondon per detru'.**

Jen

**domoj, vojoj sur teren'
mergiĝas
en akvon je plen'.**

Sur
akvo flosas laŭ plezur’
jen aŭtoj
kaj mebloj en kur’.

Kaj
homoj grupe sur altaĵ’
grundiĝas
kun granda malgaj’.

Ve
tute haltas ludoj de
publiko
senespere tre.

Nu,
sturmbatoj por sukur’
alvenas,
—la arkeoj, ĉu?

Zhuang Qixiong

Floro

Flor’
ne velku en bela hor’.
Vin montru
En bunta kolor’!

Teo

Te'
gustas bone kun ide'
kultura
de longa pase'.

Liro

Lir'
melodias per sopir'.
Ne homo
eĥas per admir'.

Nankino en Songô

Ĝoj'
fuma sur sopira voj'
Mi flirtis
ĉirkaŭ verda roj'.

Flu'
rivera kun pluva bru'.
Mi ĝemis
pro soleca sku'.

Kor'
sufera en songâ hor'.
Al kiu
pri senveka plor' ?

Penso en Printempo

Floro

**Flor’
ne velkos por bela hor’.
Penplantu!
Kiel nub-kolor’.**

Teo

**Te’
kleriga gustas bone.
Senflora
vi vivos longe.**

Liro

**Lir’
diras ĉiun kun sopir’.
En mondo
intimula mir’?**

Ŝako

**Ŝak’
mirinda kun tigro,drak’.
Ĉe nigr-blak’
al mirakla brak’.**

Libro

**Glor’
de libroj,kun bonodor’.
Legado
ĉiam sen trezor’.**

Reto

**Ret’
trans spacon,kiel raket’.
Nur persist’
ne vent-pluva met’.**

Ĉinesko

**Vi
versas kun belmelodi’.
Recitu
pro verka magi’!**



Tianxianzi (Fea Kanto)

Ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 7,7,7,3,3,7 silaboj,
laŭ rimaranĝo a,a,xa,a,a (x=senrima)

Zhuang Qixiong

Akrostika gratulo al Penseo

**Penseo kun verdafer’
En eterna versriver’
Naĝas senlace.Kia
Sinofer’!
En prosper’
Odoras ĉinesk-liver’.**



Tiaoxiaoling (Flirta Kanto)

ĉina fiksforma poemo el ses versoj de 4, 6; 6, 6; 4, 6 silaboj, laŭ rimaranĝo de aa,bb,cc. La 4-silabaj versoj konsistas el du ripetaj vortoj. Kaj la unua vorto de la kvina verso devas esti el palindrome aŭ metateze ordigitaj silaboj de la lasta vorto de la kvara verso. ekz. rimi-miri; mora-arom; nomo-mono; roso-soro.

Licius

Beleco de ĉinesko

**Kanti, kanti,
brile diamanti,
plene de animo
per ĉineska rimo.
Miro, miro:
krio en sopiro.**



Xiangjianhuan

(Ĝojo de Intervidiĝo)

ĉina fiksfirma poemo el du strofoj kun tri kaj kvar versoj respektive de 6,3,9 / 3,3; 3,9 silaboj laŭ rimaranĝo
aaa / bb,aa

Zhuang Qixiong

Ĉagreno

Sur tur' mi pensis kun
arka lun'.
Per silento ŝlosiĝas aŭtun'.

Intima,
senlima
ĉagren-pun'.
Nur pro disiĝ-senta oportun' !



Xijiangyue (Luno super Okcidenta Rivero)

ĉina fikforma poemo el du strofoj kun po 4 versoj de
66,7,6 silaboj, laŭ rimaranĝo xa,a,a (x=senrima)

Licius

Saluton al la Granda Okazo de la 30-a

Datreveno de Guangdong-a

Esperanto-Asocio (2012)

**En la nordo kovras blanka neĝo;
en la sudo brilas ruĝa suno. —
Brave mi flugas trans maloportuno
per facila vent' kun koro juna.**

**Tridek-jare, daŭrigas l' aferon
de l' verda stel', samidea kuno
ni, rikoltadas en ora aŭtuno,
semas esperon sur tero nuna.**

*** *** ***

**En la nordo blanka neĝo kovras;
en la sudo ruĝa suno brilas. —
Esperantistoj neniam senilas:**

mi brave soras per vent' facila

**Tridek-jare, daŭrigas l' aferon
ni, samidee, antaŭeniras
rikoltante. —La verda stel' stirilas. —
Sur la tero kreskas sem' aspira.**



Yijiangnan (Sopir-al-Sudo)

ĉina fikforma poemo el kvin versoj de 35,77,5 silaboj
laŭ rimaranĝo xa,xa,a (x=senrima).

Jadranka Miric (Serbujo)

Rememoro

**Faladas
iaj varmetaj
pluvoj. Ĉio odoras
je amo. Jen pluvetaj
vortoj. Poetaj.**

**Jam velkis
floro plukita.
Malfrua larmoverŝo.
Feliĉo forprenita,
kor' ĉagrenita.**

**Herbejo
ondiĝas milde.
“Ne tretu herbeteton!”
estis skribita ŝilde,
tut' konsilinde.**

Okuloj

**ĉielkoloraj
ekbrilis kompateme.
Kie estis kunlaboraj,
la tagoj oraj?**

**Tristeco
kiel nebulo
falas sur lian kapon.
Kurbigis la grizharulon.
Lacigis ulon.**

Al mia panjo

**Volus mi
vidi rideton,
vian mildan, panjeto.
Ho, kiel bonas peton
nomi sekreton.**

**Panjeto,
forflugis vi al
ĉielo endorminte.
Rigardas mi alten al
blua ĉielval'.**

**Nubetoj
sonĝe teksitaj
kviete vin alportas.
Jen la floroj plukitaj**

por vi donitaj.

**Sezonoj
ŝanĝas regule.
Nur vi malĉeestas. Mi
atestas volontule.
Propra okule!**

**Herbejo
odoras flore.
Aŭdiĝas birda kanto.
Tersaluton memore
al vi. Elkore!**

Nobla alvoko

**Okazis
al nepalanoj
la tertrema tragedi'.
Helpu al azianoj!
Ho, eŭropanoj!**

**Severa
tertremego, ho.
Pli ol ses miloj! Estis
mortigitaj homoj! Ho,
resonas eĥo.**

Retremis

**tero fortege.
Tut' malaperis Barpa.
Suferis etno ege.
Homoj multege.**

**Katmandu'
mondoheredaĵ'
estas plu enloĝebla.
Helpu homojn per nutraĵ'
kaj per teĥnikaĵ'.**

**Enlandaj
kaj eksterlandaj
fakuloj solidare
partoprenu ni, are
digne, bonfare!**

Juliaj fajretoj

**Bruniĝas
arbo surstrata.
Speguliĝas brile sun`
en fontan' troviĝanta,
alten ŝprucanta.**

**Soifaj
uloj afable
atendas sian vicon
ĉe fontan'.Pli agrable**

estus cetable.

Soifas

tero. Eê roso

bonvenigus.Nek helpus

subtera riverfoso

nek ŝtorma broso.

Blovetas

julia vento.

Aero sufokiĝas..

ĵetas homojn en tento.

Milda torento.

Aŭskultu!

Estis hakita

ho, sesjarcenta kverko.

Ho, la kverko benita

eê notita* Ve!

**notita kaj benita kverko - laŭ ortodoksa kredo kaj laŭ kutimo de la serba popolo Al neniu estas permesite haki la maljunan kverkon/ la sesjarcenta /ĉar ĉiu –jare tie kolektiĝas la popolo por festi tradiciajn festojn ekz. la vilaĝana festo „zavetina,, aŭ laŭ kutimo de malsanuloj sur la kverkon oni postlasas notojn /iliaj rakontetoj ,deziroj por resaniĝo kaj dankemoj).*

Aŭtuna vento

Aŭdiĝas

**susuro inter
branĉaro. La birdeto
subite flugis preter
poplo sur la ter'.**

**Post pluvoj
restis marĉetoj,
aŭtunaj, stratolagoj.
Tie sin banas birdoj.
Sunaj varmgŭoj.**

**Jen vento.
Amuziĝas ĝi,
dancante kun foliar'.
Rondodancon dancas ni,
belan valson, ĉi.**

**Lametas
folio akre.
Disiĝos ni kutime
ĉi-aŭtune, tutsakre,
renaskos are.**

**Ventego
per pordopuŝo
eniras domon. De post
pluvo malseka kuŝo.
Granda pluv' duŝo.**

Fuĝantoj survoje al “riĉa” Eŭropo

**Jen marŝe
fuĝas loĝantoj.
Ju pli da rifuĝantoj
des pli da martirantoj
Ve, gastigantoj.**

**Eŭropo
landlimojn fermis.
Ekkreskis dratbariloj.
Registaro protestis
pro krizo, fias.**

**Pikdratoj
multobliĝis, re
laŭlonge de landlimoj.
Troŝarĝitaj ŝipoj ne
albordiĝis. Ve.**

**Gumflosoj
malŝveligitaj,
savveŝtoj diŝjetitaj.
fuĝantoj arestitaj,
plu haltigitaj.**

Akcepto

**de fuĝintoj tut'
fiaskis. Malkvieta
iĝis Eŭropo. Salut'
kun amaragut'.**

Al Tago dediĉita al Mortintoj

**Aŭtuna
tag' memorplena
oriĝas kiel floroj
sur tombo , signoplena,
foje serena.**

**Okuloj
ruĝaj de larmoj.
Koro apenaŭ batas.
Malgajaj niaj karmoj.
Koro sen varmoj.**

**Profunda
neevitebla,
esplora cerbumado.
Sorto komprenebla,
ne plu ŝanĝebla.**

**Rideto
sur rando lipe,
iomete amara.
Vivo batita vipe**

sed pacopipe.

**Memoroj
postkuras min.Ve.
Neniam ni renkontu,
nek estos kune.
Ve, doloras tre.**

Malhela flanko de la Homo

**Kiel mi
kantu pri amo
kiam senfrukta sento
jam nestiĝis. Ĉi amo
al fi-teamo.**

**Besteca
senhonta ago
ŝokis mondon terure,
brute per sanga pago.
Fida reago.**

**Ĉagrenas
honestaj koroj.
Surdiĝas kompatemo,
humaneco, la floroj,
de la hommoroj.**

Popola

**saĝeco venkas
unuiĝante pace
kontraŭ teroro preĝas.
Pacon favoras.**

**Tamen, ni
Homojn mortigas.
Ĉu tia bonfaremo
la homojn plibonigas?
aŭ nin bestigas?**

Dubo

**Viciĝas
tagoj amare.
Nenien kondukos nin
malkonfido. Ĉi-jare
zorgas ni, pare.**

**Nescio
maloportune
forprenas, senrevene
nian feliĉon, pune.
Ploras ni kune.**

**Decembra
nigra nokto. Ho.
Senesperiganta ŝi**

**Ĉu maten' kiel eĥo
redonos vin. Ho!**

**Malamo
malrespektemo,
estas homa malfortec'
Ĉu venkos singardemo
kaj toleremo?**

**Vekiĝu!
mi preĝos forte.
Vivo unikas. KREDU
vi en amo ĝismorte
malgraŭ ĉi-sorte!**

Decembra promeno

**Mateno
nebuliĝis. Ve,
ŝi ĝojiĝis al bela
agrabla vespero, tre
ekscitis, por ke?**

**Ju pli da
emoci' des pli
da surprizoj atentos
min, elbalbutis en si,
malgajiĝa ŝi.**

**Manoj jam
ruĝiĝis froste.
Promenante tra urbo
facilvestita. Poste
tremis ĝisoste!**

**Ek al vi,
diris ŝi honte.
Kajjese li akceptis.
Ĉaron, prunteprenonte
pelis. Volonte.**

**Varmega
nigra ĉokolad'.
Kia varmeco dolĉa.
Jen, klakadis ĉarorad'.
Dank' al kamarad'.**

Blanka ĉapeleto

**Bezonis
vi manon ŝian.
Okuloj larmiĝis. Ve,
bedaŭro krias ĉiam.
Forges' neniam.**

**Klimato
tre ŝanĝiĝanta.
Aŭtunas ĉi Decembro**

**Tago sune brilanta.
Jen, vir' bananta.**

**Ĉapelet'
blanka, surkape
li honore mallevis.
Rigardadis ŝi gape.
"Via land', surmape?"**

**Rendevu'
ĉe verda valo.
infaneco senzorga.
Ekfloranta konvalo.
kaj via "halo".**

**Memoro
perfekta. Dume
ili maturiĝis. La
vojoj kruciĝis lume,
kisis brakume.**

Dankpoemo

**Neniam
mi vojaĝis al
tute nekonata land',
nek pro granda Karneval',
nek pro akvofal'.**

**Aperis
ret' kaj forviŝis ĉi
timegon. Degelis ĝi
tute en mi. Dank'al vi,
jen, ĉinesko ĉi.**

**Amikec'
kreskis senlime.
Konfidec' grandiĝis. Ni
korespondis sentime
kaj plenestime.**

**Ekame,
laŭ via propon'
verkis mi ĉineskaĵojn.
Verso laŭ mia kon'
belas pro belson'.**

**Ĉineskaĵ'
laŭ Sapiro al
Sudo, tre allogis min.
PDF-on faros vi
kaj mi versojn ĉi.**

*Ĉi tiun poemon mi dediĉis al mia ĉina amiko sinjoro
Veĵdo kiu subtenis min verki la ĉineskaĵojn.*

Sorto

Galant'

**honta, aperis
super la blanka neĝo.
Ekis vento fajfonta
al bird' falonta .**

**Degelis
neĝo. Dum vento
blovis forte laŭ la val'.
Ek aperis torento
en fi-momento.**

**Ies man'
plukis floreton.
Metis ĝin en libreton
por plenumigi peton,
retigi eton.**

**Herbari'
plibeliĝis, tre.
Nia galant' kuŝis
morta sur paper'. Plue
vivi, gravas, ve.**

**La birdet'
reaperis ie,
sekiĝis kaj forflugis.
Eĥas arbaro tie
pepmelodie.**

Vulpino kaj cikonio

**Vulpino
fi ruzgalanta
alvokis cikonional la dom'. Mi
ludanta
vi delikanta.**

**Je alta
bestonivel', ho
mi preparonta al vi
surprizon sen lamento,
sen ridoeĥo.**

**Do, venis
Cikoni' kara
al jam surtabligita
tablo. Plena plado ara
ĉe vulpopara.**

**Satmanĝis
vulpino, sed ne
blanka cikoni'. "El mal-
profunda teler"?!" Vane
mi venis. Plu ne.**

Cikoni'

**decidis al ŝi
venĝi. Por manĝi servis
en boteletojn al ŝi.
Fuĝis, vulpino fi.**

Virino kaj kokino

**Delonge
mi aŭdis tiun
fablon. En vilaĝ' iu
vivis vidvino kiun
ni ekkonos nun.**

**Fratino
ŝia loĝis for
de ŝia vilaĝo. Solas
ŝi. La Ĉielokolor'
estis ŝia kor'.**

**Decidis
ŝi malkutime
ŝanĝi ĉion. Komence
gajiĝis plenanime,
sed dubis time.**

**Kokino
po ovon tage
donis. Ju pli nutros ŝin
des pli ĝi donos tage.**

Mangô senpage.

**Dirite
farite. Kokin'
grasiĝis nekapabla
plu doni ovojn. Jen, fin'
por ora kokin'.**

Moral instruo

*Se homo deziras cxiam pli ol ili/iŝi posedas kutime perdos kaj tun
poseditan*

Printempa lunperlamoto

**Ora Lun'
brilas tut hele.
Admirega beleco.
Influas nin miele .
eĉ sangocele.**

**Naturon
savos ni certe.
Ĝoju diaj paŝtistoj.
Festu ni sciosperte
kaj bird' koncerte.**

**Aprilo
multkoloriĝas.
jen, ekfloris tulipoj.
kampflore odoriĝas.**

Vazoj pleniĝas.

**Verdiĝas
herbejo onde
fleksebla. Reviviĝas
kunvenoj, kluboronde.
esperant' monde.**

**Aprila
Luna vagado.
Vekiĝas sopirado.
Velura tagiĝado.
Amo florado.**

Larmas okuloj diaj

**Pluvgutoj
tamburadas ĉe
fenestroĵaluzioj.
Dekomence tre plaĉe
fine bruaĉe.**

**Morna tag'.
Kaŝis sin suno
sub la granda griza nub'.
Vetera fi fortuna
al homoj puno.**

Inundis,

tertremis ĉie,
kvazaŭ malfermis ĉiel'.
Fidu je Dio pie,
preĝos ni tie.

Etendu
la manojn viajn.
sankta estu via nom'.
Savu nin de diablajn
malbenojn tiajn.

Kompatu
kaj indulgu nin,
kara Di'. Harmonigu
naturon. Gajigu min.
Via verda pin'.

Somera kanto

Somera
ĉiel' flamanta
pro arda sunsubiro.
Okcidente ruĝanta,
sun' sin kaŝanta.

Sur ĉiel'
krozas nubetoj
vestitaj ruĝkoloro.
Pozas nuborozetoj

al vi, poetoj.

**La lasta
sun' okulsigno,
antaŭ vesper' malhelo.
Ŝanĝas ĝin okulsigno
de ĉiel' cigno.**

**Ariĝis
steletoj brile.
La plej brilas norda stel'.
Marvojon montras ile,
ja, lumradie.**

**Jen, Luno
malsupreniras.
Ĉe lignokaban' sidas
radie ĉaron tiras.
Lampiro miras.**

Lily

Efemera pasi'

**Ni longe
ludis jen en lit'
buŝ-al-buŝe, korp' kun korp',
kaj jam ekardis ekscit'
kun seks-apetit'.**

**Li ĝeme
erektiĝis jen
sed duondura mole,
preta por amor-festen'
per kaca promen'.**

**Konsciis
malfortecon mi,
kaj mi knedadis vikle
kaj forte ĝin pli kaj pli
por seksa ebri'.**

**Subvoĉe
li kriis ĝoje
kaj l' kaco jam malmole
serĉe palpis dumvoje
piĉon fojfoje.**

**Kredeble
mi jame ĉe l' rand'
de paroksismo staris.
Mi volis lin per kac-plant'
gasti por am-frand'.**

**Tujtuje
ĝi molis morte
kaj haltis ĉe l' apertur'**

**langvore kaj malforte
amor-aborte.**

**Terure
mi en desapont'
dronis jen ĝis ekstremo,
kun amor-avida ond'
falanta ĝis hont'.**

**Pardonon
li petis kun pi'
de mi kun ruĝaj vangoj
en tono de agoni'.
Ba, kia pasi'!**

En mallumo

**En mallum'
ni kveras kore
kuŝante sur herbejo.
Ni kisas bonhumore
kaj senpudore.**

**Li palpas
al mi leĝere
la mamojn kaj ekscitas
la eroton tenere
ĝis eko vere.**

Ekduras
miaj cicoj jam
kaj ja en mia brusto
ekbrulas soifa flam'
por ludo de am'.

Pelate
de arda dezir'
mi sentas humidigon
suban kaj preskaŭ sen spir'
krias pro ĝemŝir'.

Deteni
mi min jam ne plu
povas de amor-avid'
je venonta delic-ĝu'
en mania sku'.

Tuj kaptas
mi l' kacon de li.
Ĝin mi knedas tre forte
por impulsigi lin pli
al laŭta ĝemkri'.

Brakumas
li min strikte tre
kaj langkisas min varme,
erektiĝas firme de

pasia akme’.

**Ruliĝas
sur min rapide
li tuj kacon eligas
boras en min rigide
piŝtas senbride.**

**Tordiĝas
ni korpogluo,
frandas delicon seksan
de amludo plengue
plue kaj plue.**

**La herboj
nin tiklas per juk’,
mi nur sentas nebule
gutadon tra flu-konduk’
de ĉuro kaj suk’.**

Prete por amor’

**Jam nokte
jen en tikla hor’
mi soifas kareson
teneran vian, sinjor’,
prete por amor’.**

Mia mam’

**je via dispon'
estas via ludilo,
ja pufa kiel balon',
sub via bezon'.**

**Mia buŝ'
tremas de aspir'
kaj atendas la vian,
vian kison per entir'
kun arda dezir'.**

**Mia korp'
tordiĝas de flam'
en profundo de l'koro,
brulas al vi mia am'
ja ardanta jam.**

**Mi sentas
jukon en la kor',
mi ja ne scias kial,
ĉiam kun amodolor'
ne plu sen pudor'.**

**Humidas
mia subo jen,
suko fluetas roje,
jam prete por am-festen'.
Ek! sen ajna ĝen'!**

**Sinjoro,
mi volas pete:
etendu vian manon,
min tuŝu impete
ekagu prete.**

Vejdo

Malutila helpo

**Antikve
kampul' kretena
brulas de maltrankvilo
pri sia plantoj grenaj
en stato ĝena.**

**Cerbumis
li pri rimedo
kreskigi ilin bone
por la grajno-gravedo
en planta bedo.**

**Li simple
al kampo iris
jen kun malpacienco
kaj l' plantojn iom tiris
alten kaj diris:**

**“Tiele
ilin helpas mi
vegeti tute sane
kaj altiĝos pli kaj pli
sub suna radi’.”**

**Post penad’
li kun ĝoja sent’
lace reiris hejmen
kaj parolis kun kontent’:
“Mi jam kun prudent’**

**la plantojn
altigis per pen’
kaj elĉerpiĝis morte.
Por pli da estonta gren’
indas l’ entrepren’.”**

**Ĉe tio
la fil’ rapide
kuris al la grenkampo
esplori propravide
taksi decide**

**ĉu plantoj
kreskas normale.
Li deprimiĝis vidi,
ke l’ plantoj velkis fale**

mortis fatale.

Aĉetado de ŝuoj

ĉina antikva fablo
Malsaĝul'
en rur' izola
volis aĉeti ŝuojn
en la bazaro fora
por uz' popola.

Ĉe ekir'
la piedojn li
mezuris tre zorgeme
notis pri la dimensi'
kiel memorsci'.

Sed tamen
li forgesis jam
la dimensi-rubandon
hejme, kuris kiel ĉam'
brulanta de flam'.

Ĉe l' bazar'
li jen subite
pensis pri la rubando
forgesita mens-glite
kaj pentis ŝvite.

**Li diris
al vendist' de ŝu':
"Mi la piedmezuron
hejme jam forgesis, hu!
Atendu min, ĉu?"**

**Revenos
mi post ekpreno
de l' pieda mezuro."
Li hastis por reveno
kun mava spleno.**

**Kiam li
ree al bazar'
iris kun mezurilo,
jam ĉesiĝis negocfar'
nur ventis en knar'.**

**Nature
li iris vane
por aĉeto de ŝuoj,
reiris malplenmane
stultis infane.**

**Demandis
aliaj al li:
"Kial ne per piedoj
provis la ŝuojn ja vi,**

tiele sen sci'?"

“Ne strange,”
li tre memfide
respondis: “je piedoj
mi ne kredas konfide
sed je mi decide!”

Pluva murmuro

Aprile
alportas zefir’
etajn pluvojn de norde.
Tiktakado per inspir’
pelas al sopir’.

Pluvgutoj
tamburas teron
per delikataj frapoj
alvokas vivan veron,
bonan esperon.

La murmur’
de pluvo eta
vekas plantaĵojn per verd’,
al vigliĝo vegeta
kun forto preta.

**La ŝosoj
en pluva duŝ-ban'
jen strebas sin etendi
kun kap' de verda satan',
ha, kiel infan'.**

**Sur herboj
pendas malalte
akvaj perloj de pluvo,
kaj faladas senhalte
sur teron salte.**

**Pluvakvo
de la tegmento
gutadas sur balkonon
kun nebula prezento
en friska vento.**

**Endome
la juna paro
kveras kiel pluveto
murmuranta en falo
kun jovialo.**

Saĝa ŝafido

(fablo)

**Iutage
ŝafid' sencele**

vagadas en arbaro.
Lupo eliras ŝtele
ĝin kaptas pele.

La ŝafid'
kvankam timtrema
tamen saĝa ja estas.
Ĝi montras sin pensema
en kriz' dilema.

Ĝi diras:
“Volu, onklo Lup',
antaŭ ol min formanĝi,
amuzi min jen per flut',
la ĝojiga tub'.”

“Kial do?
Kial devas mi
ludi fluton ĉihore?”
“Laŭ via fluta ari',
antaŭ l' agoni'

de morto,
mi dancos ĝue
je kora kontentiĝo.
Poste mi jen senbrue
ne petos plue.”

**“Vi volas
eskapi ruze
per tia artifiko?”
“Ne, mi ludas amuze
do nerifuze!”
“Nu, bone,
fluton ludu mi!”
Lupo ekblovas fluton,
dancas ŝafid’ laŭ ari’
ĝue en ebri’.**

**Je flutson’
ŝafist’ rapide
alkuras, vidas lupon,
kaptas ĝin senhezite,
triumfas ride.**

**La lupo
tre pentas en gal’:
“Mi ja tute trompiĝas.
Vokas homojn al batal’
flutson’— la signal’!”**

Bovo kaj rano

(fablo)

**Ĉe lago
ludis ĝojplene
du ranetoj kaj tiam**

**alvenis bov' promene
trinki senĝene.**

**Pro mispaŝ'
mortigis la bov'
unu raneton per huf'.
Alia rano, sen pov',
kuris je ekmov'.**

**Enhejme
li al ran-patrin'
balbutis spiregante,
"La morto trafis lin,
jen mava destin',**

**panjo, ve!
Estas la frato
tretmortigita de best'
giganta per hufbato
jen sen kompato!"**

**Neniam
vidis patrin-ran'
bovon de sia naskiĝ'.
Ŝi do al sia infan'
mimis kun rikan':**

"Ĉu tiom

ĝi grandas ronde?”
Ŝi montris sian ventron
la pufigitan onde
kvazaŭ etmonte.

“Ne. Granda
ol via plie!”
Ŝi blovis sian ventron
pli pufa energie
kun brila radi’.

“Ĉu tiom
granda kiel mi?”
“Ne, ne, ne, eĉ pli granda!”
Panjo kvazaŭ kun magi’
faris ventron pli

balone
ronde ĝislime.
Antaŭ ol ŝi demandis,
Pum! krevis ventro fine
kaj rompe kline.

Sopiremo pri vi

Subite
vin deturnis vi
por foriri kruise
kvazaŭ ŝtono de glaci’

ignore al mi.

**Mi dume
kovas vin en kor',
ne povas forgesi vin
pro tiu ĝojiga hor'
en mia memor'.**

**Mi drinkas
por dronigi min
en nevenkeblan trancon
kun pika dolor' en sin'
daŭranta sen fin'.**

**Mi dormas
tre malfacile
turniĝadas de flanko
al flanko maltrankvile
kaj senkonsile.**

**Mi stelojn
kalkulas vane
enlite malespere.
Pensoj vagas promene
triste ĉagrene.**

**Mi volas
persistas pie**

**ĝis via kor' moliĝos,
vi ploros emocie
pentos ĝemkrie.**

**Kara vi,
mi penas ĉiam
esti fidela firme
al vi en la koro jam
kun sincera am'.**

**Ankoraŭ
mi kovas arde
la sopiremon pri vi
en la memoro garde,
tenas vin alte.**

Edzo fariĝis kapro

(fablo)

**La edzin'
vera megero
ŝian edzon verĝbatis
kaj sakris kun fiero
de malsincero.**

**Kiam li
enhejme restis,
ŝi ligis lin je pied'
ŝnure, kaj lin molestis**

ordone gestis.

**Je ŝia
ŝnura ektiro
li devis obei ŝin
jen per tuja aliro
agis laŭ l' diro.**

**Ne povis
li elteni ŝin.
Al li venis ideo,
sin turnis al sorĉistin'
ja por ilumin'.**

**La edzo
laŭ ŝia instru'
ŝnuris kapron je l' kolo
kaj li sin kaŝis sen bru'
dum ŝi dormis plu.**

**Post vekiĝ'
l' edzino time
trovis kapron ligitan
per ŝnur' nemalproksime
sin movi mime.**

**Panike
por bona rimed'**

**konsultis sorĉistinon
ŝi jen ĉe ties pied',
kun kompleta kred'.**

**Tiu nun
diris admone:
“Pro viaj malbonfaroj
Di' punas vin ordone,
igas bastone**

**la edzon
kapro timida.
Se vi pente riparos
vin per ago rapida
hej, kaj decida,**

**mi helpos
vere savi lin
tuj el la kapra formo—
la malfeliĉa destin',
mi ne ĝenos vin.”**

**L'edzino
ploris amare,
tenante l' kapron ĉe sin',
ĵurante lin bonfare
trakti pli kare.**

**Sep tagojn
daŭris la rito
de fastad' kaj oferad'
revoki per invito
lin sen hezito.**

**De tiam
l'edzino ne plu
malbone traktis l'edzon
kaj vivis kun li kun ĝu'
kaj bona kunlu'.**

Serĉado por saĝo

el rakontoj de Afanti
**La reĝo
aŭdis ke lia
regnan' Afanti estas
saĝa kaj multescia
kaj simpatia.**

**La reĝo
post longa vojaĝ'
lin vizitis kaj ĉuis:
“De kie jen via saĝ'
venas al kap-kaĝ'?”**

**Afanti
respondis sprite:**

**“Mi ĝin serĉadis ĉie
malfacile kaj ŝvite,
kaj senhezite.”**

**“Ĉu trovi
ĝin oni povas?”
“Jes certe, via moŝto!
Vi hojon fose movas
kaj ĝin ja trovas!”**

**La reĝo
ekĝojis pro dir’
lia kaj pensis en si:
“Oni nomas per delir’
min malsaĝa vir’.**

**Se trovos
mi saĝon vere,
mian kapon plenigos
mi ja per ĝi prefere
kaj tre fiere,**

**kaj krome
da ĝi kestojn du
mi kaŝe konservos por
mia fil’ por onta ĝu’
kaj dispono plu.”**

**Post tio
la reĝ' ordonis
lakeon preni hojon,
sekvi l' viron proponis,
ĉevalon spronis.**

**Post longa
iro peniga
ili haltis ĉe terpec'
sovaĝa, senlirika
kaj sentrafika.**

**Afanti
demetis jakon
kaj petis al la reĝo
forigi sian frakon,
eki fos-hakon.**

**Fosadis
longtempon ili,
plenaj de granda ŝvito,
sed ne trovis tie ĉi
ion de magi'.**

**“Kial mi
saĝon trovis ne?”
ĉuis la reĝ' kolere.
“Malpaciencu ne tre,**

fosu re kaj re!

**Ni plugu
teron aŭtune,
semu saĝon printempe,
jen rikoltu ĝin kune.
Ni fosu nune!”**

**Demandis
la reĝ’ scivole:
“Ĉu l’ saĝ’ dirita de vi
’stas gren’ kreskinta ore
en ter’ frivole?”**

**“Ja prave!”
diris Afanti,
“Se ne estus gren’ ĉe vi,
vi volus ĝin serĉanti
sen aroganti?”**

Mono kaj justeco

el rakontoj pri Afanti

**La reĝo
kun moka tono
ĉuis al Afanti:
“Jen justeco kaj mono,
laŭ via kono,**

**kiu pli
valoras al vi?”
Afanti tuj respondis:
“Monon ja preferas mi,
ĉar ĝi gravas pli.”**

**“Kia vir’,
Afanti!” vere
kriis la reĝ’ dubeme,
“Jen por diri sincere,
mi ja prefere**

**elektus
justecon male,
ĉar ĝi pleje valoras.”
sed mon’ aspektas pale
kaj triviale.”**

**Afanti
replikis pike:
“Homo volas nur kion
li malhavas praktike,
senartifike.”**

Kvarpieda reĝo

**el rakontoj pri Afanti
Afanti
pro okulinflam’**

**ne povis vidi klare,
sed la reĝ' ordonis jam
al li kun malam'**

**rigardi
distinge tion
kaj alion ruze por
montri siajn envion
kaj ironion.**

**Li moke
ĉuis per voĉbru':
"Afanti, je via vid',
via azen' nur unu
fariĝis du, ĉu?"**

**Ja vere
jam riĉiĝis vi!"
Afanti tuj respondis:
"Via moŝto, laŭdu mi
pri via magi'.**

**Vi vere,
laŭ vido mia,
fariĝis kvarpieda
azeno jam senscia
kaj apatia."**

Verda persistanto

omaĝe al 60-jariĝo de esperantisteco de Eĉino
(Guozhu)

**Multegas
ĉinoj en la mond'
sed Eĉino 'stas nura,
li aktivas en E-rond'
kun granda volont'.**

**Tempdaŭro
de sesdek jaroj
prezentas liajn spurojn
de abelecaj faroj —
beletraj varoj.**

**Eĉino —
verkanto lerta —
skribas esperante kaj
ĉine kun fido certa
per mano sperta.**

**Poemojn
kaj prozojn vere
li ja verkis abunde
kun flua tekst' leĝere
stila libere.**

**Eĉino —
la pioniro
de ĉinesko — kultivas,
akvumas kun aspiro
idojn en milo.**

**Sub lia
zorgo amema
kreskas ĉinesk' prospere
en ĝardeno poema —
trezoro gema.**

**Eĉino —
bona orator' —
propagandas kaj pledas
nian lingvon kun fervor'
sen ajna langvor'.**

**Ĉie ajn
ŝancon kaptas li
por disvastigi l' lingvon
konvinki kun emoci'
kaj granda pasi'.**

**Aĥ, amik'
kaj kara mentor',
li meritas respekton
kaj saluton de ador'**

pro sia labor’!

Li nesubigebla

el rakontoj pri Afanti

**Iu reĝ’
opiniis sin
saĝa kaj multescia
kaj subigis kun obstin’
per ĉuoj sen fin’.**

**Afiŝis
la demandon li
“Kie troviĝas centro
de l’ mondo?” al la naci’
jen por opini’.**

**Laŭ ordon’,
respondos prave
la homo— premiita,
tiu eraros mave—
punita glave.**

**Multegaj
homoj foriris
post lego de l’ afiŝo,
ĉar ĉiuj ja deziris
sed vespiris.**

**Afanti
kun sia azen'
nur iris al la palac'
doni la respondon jen
kun memfid-mien'.**

**“Vi scias
do, ja memfide,
kie troviĝas centro
de l' mond'?” Reĝo mokride
ĉuis acide.**

**“Jes, via
moŝt', senerare
ĝi kuŝas tie, kie
mia azen' ja stare
sin trovas klare.”**

**“Ne kredas
mi! Deliras vi!”
la reĝ' replikis pike.
Memdefendis Afanti,
“Tie ĝuste ĝi**

**situas.
Mezuru vere
vi la tutan mondon, do.
Se malĝuste, severe**

punu min infere!”

“Nu, tio...”

zumis voĉbrue

la reĝ’ kaj nur post longe

lante demandis plue,

“Respondu due,

kiom da

steloj ĉiele?”

“Ili samnombras kiel

viaj haroj cifere

tutcerte vere.”

La reĝo

koleriĝis nun,

“Sensencaĵo! Trompaĵo!”

“Se eraras jen la sum’

tenu min per pun’!”

Afanti

diris altsone,

“Iru ĉielen, nombro

la stelojn ja persone,

memoru bone!”

“Do... al mi

diru detale,

**kiom da haroj estas
sur mia vizaĝ' totale?
Multege sable?"**

**Trankvile
Afanti per man'
levis sian azenan
voston kun buŝa rikan',
montris al tiran',**

**"Ha, vidu,
vidu ja klare!
Viaj vangharoj nombras
tiom, kiom, kompare
kaj senerare,**

**la haroj
de vosto ĝia!"
"Aĥ, kia absurdaĵo!"
Reĝ' fariĝis rabia
kaj malracia.**

**Li kriis
kaj frapis forte
la tablon kaj insultis,
tordis sin malkomforte
kaj palis morte.**

**Kun aplomb’
Afanti kun saĝ’
aldonis, “Jen kalkulu
harojn sur via vizaĝ’
ja laŭ via plaĉ’,**

**kaj poste
tiujn sur la vost’
azena tre zorgeme,
vi trovos, je ajna kost’
mi pravas ĝis ost’.”**

Sorĉa povo kontraŭ pluvo

el rakontoj pri Afanti

**La reĝo
iris ĝojplene
ĉasi kun korteganoj
dum Afanti ĉagrene
sekvis sintrene,**

**ĉar ili
rajdis impone
sur kurĉevaloj kaj li
sur poneo dispone
jen laŭordone.**

**Dumvoje
tondris subite,**

**fulmadis kaj pluvegis,
ĉiuj ja surprizite
fuĝis evite.**

**Kaj ili
galopis grege
en urbon por ŝirmi sin
sed en vestar' malseka
pro bat' pluvega.**

**Afanti
pro fi-ĉevalo
ne povis rapidi sed
nur haltis dum pluvfalo
ĝis la finalo.**

**Li saltis
de ĝi rapide
kaj demetis la veston
kaj ĝin ŝovis konfide
sub selon glite.**

**Post pluvo
aperis suno.
Li surmetis la veston
kaj rajdis kun kant-zumo
en plena juno.**

**Kiam li
palacon iris,
jen la reĝo vidis lin
en seka vest' kaj miris,
“Kiel akiris**

**sekecon
vi en pluv-kovro,
dum ni tramalsekiĝis?
Ĉu estas sorĉa povo
en via movo?”**

**Afanti
diris ridete:
“Ne, via reĝa moŝto,
kiam vi fuĝis cede,
pluvo obsede**

**vin sekvis,
dum al ĝardeno
bela mia ĉevalo
min kondukis sen peno
kaj ajna ĝeno.**

**Jen tie
brilas la suno,
pompas floroj kaj birdoj
kantas en arb-brakumo,**

lirlas roj-rumo.

**Ĝi estas
jen en la mondo
la plej bela ĝardeno,
al mi plaĉis la montoj
kaj klaraj ondoj.**

**Pro tio
iom malfrue
mi revenis al palac',
staras ĉe vi genue
kun tim' senbrue.”**

**La reĝo
gapis kun envi'
tre deziris iri al
loko plena de magi'
kaj, ha, fantazi'.**

**Jen ili
en la dua tag'
iris ĉasi denove.
Ilin trafis pluv-atak'
dum ilia vag'.**

**Ĉifoje
Afanti rajdis**

sur reĝa ĉevalo sed
tiu poneon ŝatis
kaj vipe batis.

Ĉe ekpluv'
Afanti donis
vipadon al ĉevalo,
ĝin galopi ordonis
kaj plue spronis.

Apenaŭ
pluvguto eta
lin kaptis post reveno
per kurĉeval' impeta
kaj longpieda.

Sed tamen
la stulta pone'
haltis pro tim' al tondro,
rifuzis rapidi tre
dum pluva akme'.

En pluvad'
la reĝ' mizere
tramalsekiĝis ĝis haŭt',
embarasiĝis vere
veis sufere.

**Vidinte
Afanti-n, brule
de kolero la reĝo
muĝis: “Vi senskrupule
trompis min mule!”**

**Afanti
diris ridete:
“Se sub selon vi metus
la vestojn, vi tutcerte
povus komplete**

**reveni
seka tuttute
kaj ne viaj vestaĵoj
malsekiĝis pluv-gute
ja absolute!”**

Omaĝe al Kampo de Literaturo

**Printempe
degelas glaci’,
ekverdas jen la kampoj,
ekplugas la teron ni
jen kun energi’.**

**Ni semas
ne tritikon, sed
semojn de literatur’**

**sur pura kaj varma bed’
sub zorgema bred’.**

**Kun helpo
de viviga vent’
kaj karesa pluvo ni
kultivas per diligent’
kaj riĉa talent’.**

**Somere
vetera favor’
kreskigas plantidojn, ni
flegas ilin sen langvor’,
per saĝa labor’.**

**Surkampe
ni penu kune
akvumi, sarki, sterki,
kamplabori subsune,
ja ŝvit-konsume.**

**Aŭtune
ondoj de oro
ruliĝas en la kampo.
Jen fruktoj de valoro—
nia laboro!**

Post penoj

**ni rikoltas jam
multajn poemojn, prozojn
de homoj kun aŭ sen fam'
kreitajn kun am'.**

**La KL—
la bed' de kultiv'—
pliigas trezorejon
de nia kultura viv'
per nia kreiv'.**

P.S. La retejo de Ĉina Radio Internacia pretas malfermi rubrikon
Kampo de Literaturo kaj mi verkis ĉi tiun ĉineskajon omaĝe al ĝi.

Plantado de oro

el rakontoj pri Afanti

**Afanti
sur sia azen'
rajdis al la kamparo
kun pruntita oro jen,
poste ĉe sabla teren'
kribadis sen ĝen'**

**la oron.
Ĝuste por ĉaso
la reĝo renkontis lin
tie je preterpaso**

ĉe sablamaso.

**“Afanti,
kion faras vi?”
ĉuis li miroplene,
“Ne tenu min ja sen sci’,
respondu al mi.”**

**Respondis
Afanti ruze,
“Mi plantas oron, Moŝto.”
Tio kirlis amuze
lin kaj konfuze.**

**La reĝo
jen demandis plu,
“Kial vi plantas oron?”
“Ĉu vi ne komprenas, fu?
Nur inter ni du!**

**Mi semas
ĝin en teron nun,
post zorgema kultivad’
mi rikoltos en tempum’
ĝin je granda sum’.**

**Ekbrilis
la okuloj de**

la reĝ' kaj li konsilis,
"Vi estas malriĉa tre
kaj or-manka, ve!

Se semus
vi pli da or',
vi rikoltus pli multe.
Eĉ per penega labor'
vi povus, sinjor',

ne grandan
profiton vere
ricevi el plantado!
Iru al palac' prefere
kaj eĉ libere.

Vi rajtas
preni, kiom vi
volas. Ĉe rikoltado
la oron dividos ni.
Okdek procent mi

ricevos
kaj vi ja dudek!"
Afanti respondis do,
"Ha, vere bona ide'!
Ni tuj agu ek!"

Afanti

en la posta tag'
prenis du ĝinojn* da or'
el la palaca monlag'
por rikolta pag'.

Redonis

per la reĝa or'
li la pruntitan monon.
Temp' rapide pasis for
ĝis rikolta hor'.

Denove

li prunteprenis
jen dek ĝinojn da oro,
al la reĝo alvenis,
ĝin antaŭtenis.

Kun ĝojo

la reĝ' ridete
vidis la brilan oron,
decideme kubĵete
volis pli prete.

Subuloj

sub lia ordon'
jen donis al Afanti
kestojn da or' el reĝ-dom'

por urĝa bezon’.

Afanti
post hejmenreven’
redonis la pruntitan,
disdonis oron kun ben’
al povruloj jen.

Post semajn’
li kun trist-mien’
iris viziti reĝon
malĝoja kun man-malplen’,
dronante en splen’.

La reĝo
ĉuis avide,
“Kial ne venis ĉaroj
kun oro ja laŭvide?
Diru rapide!”

“Ve al mi!”
Afanti plore
diris, “Ĉu vi ne vidis,
ke ne pluvis favore
eĉ unuhore.

La oro
semita tute

**mortis ja pro sekeco.
Ni perdos absolute
ĉion ĝisnude!”**

**Eksplodis
la reĝ’ pro koler’
kaj kriis, “Sensencaĵo!
Min vi trompis per malver’
jen pro malsincer’.**

**Diru nun,
kiel povus or’
formorti pro sekeco?
Ĝi ne similas al flor’
sen pluva likvor’.”**

**Afanti
diris trankvile,
“Vi ne kredas tion, ĉu?
Do, kial vi facile
kredas delire**

**kreskadon
de or’ post semad’?”
La reĝo tuj mutiĝis
desaponta sen parad’
kun vanga skarlat’.**

** ĉina mezurunuo de pezo egala al duona kilogramo*